
G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

N° 05
1966

**Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti**



IFEA

## NEKROLOGOJ

Kun granda konsterno ni anoncas la forpason de la Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio:
Grafo Adv. Ademaro BARBIELLINI-AMIDEI
okazinta en Torino la 6-an de aŭgusto.

Grafo Barbiellini, kiu sinjorece regis la sortojn de F.E.I. dum ses jaroj, estis antaŭ nelonge trafita de senespera malsano, kiu forrabis lin de la amo de liaj familianoj kaj de la estimo de ĉiuj italaj esperantistoj.

Nepre neforgesebla estos lia afabla sinteno, lia sincera sindediĉo kaj lia saĝa ekvilibro en la laboro por nia asocio.

Dufoje, en la daŭro de malmultaj jaroj, ni perdis grandan Prezidanton!

Nun, pli ol antaŭe, estos necesa ĉies helpemo por superi la malfacilan momenton, kiun trairas nia nacia movado.

La Esperanto-movado ĝenerale kaj la fervojista Esperanto-movado aparte, ricevis novan fortan baton: la lasta 16-an de septembro tuj antaŭ la ekkomenco de la 37-a Nacia Kongreso en Carrara mortis en Bologna en la aĝo de 73-jaroj nia kara:
Cav.Uff.D-ro Inĝ. Giuseppe ALBONETTI
eks grava funkciulo de Ŝtataj Fervojoj, estrarano de Itala Fervojista Esperanto-Asocio (I.F.E.A.) kaj eks Prezidanto de la Bologna Esperanto-Grupo "Achille Tellini".

Dum la lasta junia monato mortis en Voghera nia kara:
Samideano Gerolamo MONTAGNA
de longe fidela membro de nia Asocio kaj simpatia partoprenanto de niaj kongresoj.

Ke ili ripozu en paco!

## COMUNICATO

Col 16° Convegno annuale della "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" tenutosi il 18 settembre 1966 a Marina di Carrara, nel quadro del 37° Congresso Italiano di Esperanto, si é aperto il nuovo anno finanziario 1966-67. Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al più presto.

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega il bollettino di versamento nel C.C.P.nº8/24094 intestato all'IFEA, Via D.Creti, 61 BO.

Le quote sociali per l'anno 1967 restano le seguenti:
- Associazione all'I.F.E.A., all'U.E.A., all'I.F.E.F. e alla F.E.I. con abbonamento alla rivista "L'Esperanto", £. 2.500,- annue.
- Associazione solamente all'I.F.E.A. ed all'I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla F.E.I. ed all'U.E.A. direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali), £. 1.000,- annue.

Si prega vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per l'anno 1966, e continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote 1966 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti, oppure trasmettere le loro dimissioni per non pagare, anche per l'anno 1967, le loro quote alle suddette Associazioni.

## RAPORTO DE LA NACIA KUNVENO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO
## MARINA DE CARRARA - Dimanĉon la 18-an de septembro 1966-a

La Jara Kunveno de I.F.E.A., en la kadro de la 37-a Itala Kongreso de Esperanto, okazis en Marina de Carrara, dimanĉon, la 18-an de septembro 1966-a, en la salonoj de la hotelo "Mediterraneo" tuj post la Ĝenerala asembleo de Itala Esperanto-Federacio.

La sekretario memoris la ĵus mortintan D-ron Inĝ.Giuseppe Albonetti el Bologna, estrarano de nia Asocio kaj akcentis la neceson renovigi la estraron kaj precipe anstataŭi la mortintan konsilanton. La sekretario memorigis ankaŭ nian membron s-anon Gerolamo Montagna el Voghera kiu mortis dum la lasta junio.

Oni konfirmis kiel Honorajn Membrojn: Lian Moŝton Adv.Raffaele Bagnulo el Bologna kaj Grafon Kolonelon Antongiulio Fontanive Mazzaron di Pratalbo el Roma. La Estraro estis konfirmita jene:
Prezidanto: Prof.D-ro Inĝ.Bernardino Lattanzi di Monterubiaglio el Roma
Vicprezidanto: D-ro Inĝ.Giordano Azzi el Como
Sekretario: Per.Ind.Germano Gimelli el Bologna
Vicsekretario: Univ.Stud.Antonio De Salvo el Roma
Kasisto: S-ro Giulio Catena el Bologna
Kaskontrolantoj: Per.Ind.Agostino Righi el Bologna kaj S-ro Dino Lanzoni
Konsilantoj: Rag.Aldo Formaggio el Torino
S-ro Claudio Pivari el Porretta Terme (Bologna).
Delegito de I.F.E.A. ĉe estraro de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kiel Itala Komitatano: Per.Ind.Germano Gimelli el Bologna
Reprezentanto de I.F.E.A., kiel Faka Asocio, ĉe la estraro de Itala Esperanto-Federacio: Komm.Francesco Domenico Ramolfo el Torino.

Poste la sekretario raportis pri la gravaj rezultoj de la 18-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso okazinta dum majo en Utrecht (Nederlando) kaj pri la mirindaj Fervojistaj tagoj okazintaj en Budapeŝto dum la 51-a U.K.. Tiuj lastaj estas aparte interesaj pro la ĉeesto al la manifestacioj (ekskursoj, teknikaj klarigoj pri la mezurilvagonoj, faka prelego, k.t.p.) de la Ĝenerala Direktoro de la Hungaraj Ŝtataj Fervojoj (M.A.V.) kiu estas Vicministro pri Transportoj kaj Komunikado. S-ro Gimelli donis informojn pri la venonta 19-a Kongreso de I.F.E.F. kiu okazos de la 6-a ĝis la 12-a de majo 1967-a en Fulda (Germanujo) kaj anoncis ke eble la 22-a I.F.E.F.-Kongreso okazos en Italio dum la jaro 1970-a.

Fine oni decidis sendi peticion al la Ĝenerala Direktoro de Ŝtataj Fervojoj kaj al la Ministro pri Transportoj, por la jenaj tri punktoj:
1-e) Aldono de Esperanta teksto en la klarigoj faritaj en pluraj lingvoj, en la unuaj paĝoj de la Fervoja horaro, samkiel jam faris pluraj eùropaj kaj ekstereùropaj landoj.
2-e) Aldono de Esperanto inter la lingvoj konataj de la deĵorantoj de la informaj oficejoj de la stacidomoj. Do, starigo de Esperantaj kursoj por interpretistoj kaj por ĉiu personaro en kontakto kun eksterlandaj vojaĝantoj, ĉe la Profesiaj lernejoj de la Ŝtataj Fervojoj.
3-e) Starigo de Esperantaj tabuloj en la elirejoj de la ĉefaj stacidomoj kun la indikoj de la Grupoj aù de la lokaj esperantistoj al kiuj povas sin turni la eksterlandaj vojaĝantoj, kiel jam faris diversaj landoj kaj la itala stacidomo de Torino.

<u>19-a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO (I.F.E.F.)</u>
en Fulda (Germanio) de sabato, 6-a de majo, ĝis vendredo, 12-a de majo

<u>Adreso de L.K.K.:</u> 19-a IFEF-Kongreso, poŝtfako 70 0746, D-6 Frankfurt (Main)
<u>Banko:</u> Eisenbahn-Spar- und Darlehnskasse Frankfurt (Main) konto-numero 40 051 aù ties poŝtĉekkonto Frankfurt (Main) n-ro 569 08 kun la indiko "19a IFEF-K."
<u>Kongresejo:</u> Oranĝerio en la rezideja palaco de Fulda
<u>Kongreskotizo:</u> Ĝis 31-a de decembro 1966: 26 germ.markoj. Ĝis 15-a de marto 1967: 32 germ.markoj. Ĝis 20-a de aprilo 1967: 38 germ.Markoj. Por pensiuloj, edzinoj kaj junuloj (malpli ol 19-jaraj) la sumo estas la duono.
<u>Limdato:</u> Ĉiuj aliĝiloj devas atingi L.K.K. plej malfrue la 20-an de aprilo 67.
<u>Simbola aliĝo:</u> Minimume 8 germ.markoj. Tiuj personoj ricevos tuj unu folion da glumarkoj, poste la kongreslibron kaj la kongres-insignon.
<u>Aliĝilo:</u> Aliĝiloj estas aveblaj per la L.K.K. Ĉiu membro de la "Internacia Fervojista Esperanto-Federacio "I.F.E.F." ricevos unu aliĝilon per la organo.
<u>Glumarkoj:</u> La dukolore presitaj glumarkoj montras la kongresejon. Unu folio (25 glumarkoj) kostas 1 germ.markoj plus 20 pfenigojn por sendkostoj aù tri internaciajn respondkuponojn. Bonvolu mendi ĉe L.K.K.

Loĝigo: L.K.K. transprenas la loĝigon en kunlaboro kun la loka trafikoficejo nur por aliĝintaj kongresanoj. La antaŭmendo kostas 1 G.M. po lito. La provizoraj prezoj po lito kaj nokto (en dulita ĉambro) inkluzive la matenmanĝon, ekskluzive la servmonon estas. a)Hoteloj: 15 ĝis 20 G.M. b)Hoteloj: 11 ĝis 15 G.M. c)Gastejoj: 8 ĝis 12 G.M. d)Amasloĝejo (tre limigita): 3 GM. Hoteloj kaj gastejoj situas proksime de la kongresejo kaj estas atingeblaj piede en 5 ĝis 20 minutoj.
Manĝaĵoj: En la kongreseja restoracio estas haveblaj 4 tre favorprezaj menuoj (tagmanĝoj por la 7a, 8a, 9a kaj 11a de majo), kuponoj povas esti antaŭmendataj per aliĝilo; entuta prezo: 20 GM. Krome oni tie povas manĝi laŭ karto.
Ekskursoj: A. Posttagmeza ekskurso per aŭtobuso al la eksterurba palaco "Fasanerie". Prezo por veturo kaj eniro al la muzeo: 3,50 GM. Dato: mardon, la 9-an de majo. B. Tuttaga ekskurso per trajno al la mezepoka romantika urbeto Rothenburg ob der Tauber. Prezo por veturo kaj du manĝoj: 24 GM. Dato: merkredon, la 10-an de majo. C. Tuttaga ekskurso per aŭtobuso tra la proksima Rhön-montaro. Prezo por veturo kaj tagmanĝo: 10 GM. Dato: vendredon, la 12-an de majo.
Lingvaj ekzamenoj: Por kongresanoj el germanlingvaj landoj ekzistas la ebleco partopreni lingvan ekzamenon laŭ la kondiĉoj de la Germana Esperanto-Instituto. Aliĝu ĉe S-ro D-ro Wilhelm Lang, Fuchshohl 6, D-6 Frankfurt (Main) - 50 Germanio. Prezo pagota dum la ekzameno: 20 GM.
Postkongresa aranĝo: De la 13-a ĝis la 16-a de majo 1967 okazos en Hamburg la 45-a Germana Esperanto-Kongreso. Partopreno estos ebla pere de aparta aliĝilo havebla ĉe "45-a Germana Esperanto-Kongreso, D-2 Hamburg 26, Elise-Averdieck-Str. 34 I". Por la membro de I.F.E.F. la aliĝiloj estos distribuataj per la federacia organo "La Internacia Fervojisto". Interesuloj povas vojaĝi post la fino de la 19-a I.F.E.F.-Kongreso rekte al Hamburg.
Provizora programo: La akceptejo en la stacidomo Fulda estos malfermata de la 5-a de majo, 18-a horo, ĝis la 7-a de majo, 8-a horo. La kongresoficejo estos malfermata la 6-an de majo de la 8-a ĝis la 23-a horo, la 7-an de majo de la 13-a ĝis la 18-a horo kaj dum la ceteraj tagoj laŭbezone. La malfermaj tempoj de la aliaj giĉetoj estos poste publikigataj.
Sabaton, 6-an de majo: 15 - 17: lingvaj ekzamenoj, skriba parto. 17 - 18: Kunsido de IFEF-estraro kaj LKK. 20 - 24: Interkona vespero kun dancado.
Dimanĉon, 7-an de majo: 8 - 9: Diservoj. 9,30-12,15: Solena malfermo de la kongreso. 12,30: Komuna fotografado. 14,30-16,30: Lingvaj ekzamenoj, buŝa parto (publika). 17: Bankedo. 19,30-21,30: Teatra vespero.
Lundon, 8-an de majo: 9 - 12: Unua komitatkunsido (nepublika). 9 - 12: Vizito al lokaj entreprenoj. 14 - 17,30: Dua komitatkunsido (nepublika). 14 - 17,30: Vizito al lokaj entreprenoj. 20 - 1: Balo.
Mardon, 9-an de majo: 9 - 12: Unua laborkunsido (publika). 14 - 15: Kunsido de la fakprelega komisiono. 14 - 16: Kunsido de la terminara komisiono. 14 18: Ekskurso al la eksterurba palaco "Fasanerie". Por la partoprenintoj la kunsidojn trafikos apartaj aŭtobusoj. 20 - 22: Unua fakprelego.
Merkredon, 10-an de majo: 7,30-22,30: Tuttaga trajnekskurso al Rothenburg.
Ĵaŭdon, 11-an de majo: 9 - 12: Dua laborkunsido (publika). 9 - 12: Ekskursoj por virinoj. 14 -15,30: Dua fakprelego. 17 - 18: Futbalmaĉo de IFEF-junularo kontraŭ loka teĉmento. 20 - 24: Komuna distra vespero kun dancado por kongresanoj kaj lokaj fervojistoj.
Vendredon, 12-an de majo: 8,30-16,30: Aŭtobusekskurso tra la proksima Rhön-montaro. 17: Fermo de la kongreso en la kongresejo.

Ĉi tie ni mencias al niaj legantoj la grandan sukceson, kiu kaŭzis la fakto spertebla en Nederlando ĉe ĉiu telefonĉelo publika: ankaŭ en Esperanto oni povas legi la klarig-tekston pri la manipulado! (El Hungaria Fer.Mondo)

ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON!!!

## KIE KONGRESOS LA FERVOJISTOJ EN 1967?

La 19-a I.F.E.F.-Kongreso okazos de la 6-a ĝis la 12-a de majo 1967 en Fulda. "Germana Esperanta Fervojista Asocio (G.E.F.A.)" elkore invitas fervojistojn kaj ĉiujn amikojn de Esperanto. La kongresurbo Fulda evidente prezentas multajn avantaĝojn. Kelkaj estu menciataj: -Fulda estas mezgranda urbo. Ĝi situas centre en Eŭropo kaj estas facile atingebla per rapidtrajnoj.
-Ĉiuj aranĝoj okazos en unusola belaspekta kongresejo meze en la urbo.
-Proksimaj hoteloj kaj gastejoj garantias kongreson de malgrandaj distancoj.
-La programo estas multpromesa, ankaŭ por junuloj, pensiuloj kaj nefervojistoj. Tamen restos sufiĉe da tempo libera por propra eluzo.
-La eblecoj viziti vidindaĵojn kaj konatiĝi kun enloĝantoj estas favoraj.
-Pluraj ekskursoj kompletiĝos la bildon pri kongresregiono kaj lando.

## R E C E N Z O J

I.O.E.-GAZETO: Organo de Instituto por Oficialigo de Esperanto - Nova gazeto, kiu celas evidentigi kaj akceli la praktikan uzadon de Esperanto en plej diversaj medioj. Jarabono 2 Usonaj dolaroj aŭ egalvaloro jare (por 10 numeroj). Abonebla ankaŭ ĉe nia sekretariejo: Via Donato Creti, 61 Bologna.
ABONU I.O.E.-GAZETON, ĜI ESTAS LA GAZETO DE ĈIU PROGRESEMA ESPERANTISTO!

EL HISPANIO: Belegajn afiŝojn kaj faldfoliojn oni povas ricevi de Hispana Ministerio pri Informado kaj Turismo en Madrido. Oni povas peti ilin, esperante, ĉe: MINISTERIO DE INFORMACION Y TURISMO - SERVICO DE PUBLICACIONES Avenida del Generalisimo, 39 MADRID/16 (Hispanio).

## E S P E R A N T O E N L A R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO - Casella Postale 320 ROMA (Italia) - JARO 1966-a
La dissendoj okazas ĉiudimanĉe de h.17,35 ĝis h.17,50 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 25,20=Mc/s.11,90 kaj metroj 31,33=Mc/s.9,57. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto"; la unua parto al la temoj:
NOVEMBRO 1966-a: 2073 dimanĉon la 6-an: Tra la literaturo - 2074 dimanĉon la 13-an: Novaĵoj el Italujo - 2075 dimanĉon la 20-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - 2076 dimanĉon la 27-an: Italaj belartaj urboj: Bergamo.
DECEMBRO 1966-a: 2077 dimanĉon la 4-an: La itala verkisto Emilio Cecchi - 2078 dimanĉon la 11-an: Italaj regionoj: Toskanio - 2079 dimanĉon la 18-an: La fama pentristo Giovanni Bellini - 2080 dimanĉon la 25-an: Kristnasko.
RADIO ROMA - Esperanto-Fako - Redaktoro: L.MINNAJA

PAROLAS POLA RADIO - VARSOVIO....: Programo de la Elsendoj en Esperanto Oktobro 1966 - Aprilo 1967. Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la horo 16,30 ĝis la 17,- horo laŭ la mezeŭropa tempo, duonhoran programon en Esperanto sur la jenaj ondoj: mallongaj: 31,01 m.(9675 kc/s), 41,18 m.(7285 kc/S) 41,99 m.(7145 kc/s), 42,11 m.(7125 kc/s), 48,90 m.(6135 kc/s), 50,42 m.(5950 kc/s). Aŭskultu niajn konstantajn elsendojn. Karaj geaŭskultantoj!
Ĉeokaze ni deziras ankoraŭ informi vin pri kelkaj verŝajne interesaj aranĝoj de la Esperanto-Redakcio. Se vi havas Esperanto-amikojn ie ajn en Eŭropo, kaj certe vi havas, vi povas sendi al ili salutojn, esprimon de memoro kaj simpatio pere de nia "Koncerto kun bondeziroj". Por la aŭdigo de la salutoj kaj bondeziroj necesas nur sendi la precizan adreson de la salutotaj personoj. Krome, la Pola Radio aranĝas por la eksterlandaj aŭskultantoj diversajn konkursojn kun pluraj valoraj premioj, kiel ekz. senpagaj vojaĝoj kaj restadoj en Pollando. Se vi interesiĝas pri Pollando kaj deziras ekscii pri ĝi kiel eble plej multe, se vi ŝatas polan popolan muzikon, polan literaturon, arton, kaj ankaŭ scivolas pri la esperantista movado en la lulilo de la internacia lingvo kaj en la tuta mondo - aŭskultu niajn ĉiutagajn elsendojn. Ĉiujn niajn aŭskultantojn ni petas sendi rimarkojn pri la enhavo kaj formo de niaj disaŭdigoj. Nia adreso: POLA RADIO, Esperantaj Disaŭdigoj, Varsovio (Pollando).